

LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Oktobro 2019

(51a jaro)

N-ro 181

Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - B-3300 Tienen

Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste

James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini, 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP



**Malantaŭo de la poŝtkarto pri la ekspozicio, okazanta ĉe la Poŝta kaj
Telegrafa Muzeo Mezeŭropa, pri la temo: “Triesto kaj Esperanto -
Filatelo en la evoluado de la Internacia Lingvo en Triesto”.**

Inaŭguro estis je la 23^a de aŭgusto.

La ekspozicio daŭros ĝis la 28^a de septembro 2019.

Kara Legantaro,

Eble vi jam pensis, ke via prezidanto forfuĝis kun la ELF-AREK-kaso al malproksimaj paradizaj landoj aŭ ke simple ŝi estis decidinta eksiĝi de sia posteno. Ne, tute ne! Post mia cirkulero enreta, kiun mi parte aperigos ĉi-sube por ke ankaŭ liganoj, sen reta kunligo, povu scii pri kio mi estas parolanta, mi ricevis kelkajn tre amikemajn mesaĝojn, instigantajn min daŭrigi la laboron kune kun firma aserto pri estonta kunlaboro, dum aliaj, nehavantaj la eblon kontribui regule per artikoloj aŭ informoj, almenaŭ certigis pri sia konstanta pago de la mem-brokotizo. Ankaŭ tio ĉi gravas, ĉu ne?

Viaj atestoj pri la sincera deziro plu vivigadi nian Ligon varmigis mian koron kaj donis elanon al plua daŭrigo. Min iel kortuŝis la kelkvorta mesaĝo de malproksima ĉina amiko *Gao Zheng-xing*:

“Kara Elda. Mi ŝatas nian ELF-AREK, mi ŝatas legi nian LVL. Ne malaperigu ĝin.”

Jen parto de mia lasta cirkulera mesaĝo, skribita fine de julio:

Kaj nun pri la aŭgusta LA VERDA LUPEO: ĝis nun mi ricevis kontribuojn de Albert Boon, James Piton, Peter kaj Zsofia el Herzberg: ĉu neniŭ anonciĝas por min helpi en tiu ĉi malfacila momento por mi pro la organizado de la itala Kongreso? Ho, kiom mankas al mi la kara Rudolf Burmeister, ne nur kiel amiko sed vere - pri tio mi devas konscii - kiel neanstataŭebla redaktoro.

Tiu ĉi estos mia lasta alvoko: se neniŭ reago atingos min, mi malĝoje devas ekpensi ke neniŭ plu interesiĝas pri nia ELF-AREK kaj tial mi forĵetos la torĉon transdonitan al mi de nia neforgesebla Rudy kaj demisios de miaj tri postenoj: Prezidanto, kasisto kaj redaktanto, kaj anoncos al UEA pri malfondo de nia Ligo. Mi varme esperas ke vi tion ne deziru - sed ĉi-foje vi devas sincere diri vian opinion, ĉar NUR de VI dependas la pluekzisto de ELF-AREK. Kaj dependas ankaŭ de la rezulto de tiu ĉi alvoko, ĉu ĝi daŭrigos sian filatelan vojon aŭ ne. Via silento signifos malinteresiĝon. Nu, se ELF-AREK malaperos, estos nur via la kulpo.

Antaŭ ol sendi ĝin, mi multon pripensis, ĉar ĝi ŝajnis al mi eble tro drasta, sed fine mi decidiĝis kaj - ho, jes! - ĝi efikis pozitive.

Do, dankon al kiuj reagis; dankon pro viaj promesoj; dankon al la redakta skipo kiu ekde tuj metis sin je mia dispono; dankon al ĉiuj kiuj ne forlasos nian Ligon! Ek al labor' ni ĉiuj kune! Vivu Esperanto kaj Vivu ELF-AREK!

Via Elda

Poŝtkartoj: kia pasio!

Gravan lokon en la temo-sekcio de ELF-AREK okupas la kolekto de E-poŝtaj kartoj, kiuj komencis cirkuli tra la mondo fine de la 1800aj jaroj. Kiam *kreskis* en mi senbride tia pasio, ne tiom facilis eltrovi ilin: tial - je ĉia bona okazo - jen ĉeesto en urbaj aŭkcioj, jen vizitoj de pulmerkatoj, enlande aŭ eksterlande, de antikvaĵejoj, kie prezoj estis tamen ĉiam tro altaj, ĝis ... finfine aperis rete virtualaj aŭkcioj kiuj foje ofertis je absurdaj prezoj neniel valoran glumarketon aŭ je ridindaj kostoj altvaloran pk-on kun ekz. subskribo de Felikso Zamenhof!

Sed ni komencu de la ... komenco: unue, oni tutcerte scias, ke la tiel nomata "poŝta karto" datas de la 19a jc. La unua en la tuta mondo estis eldonita de la aŭstria poŝto, nomita "*Correspondenz-Karte*", je la 1a de oktobro 1869, probable fare de iu profesoro de la Viena Militakademio.

Per ĝi oni intencis anstataŭigi, por la tiel dirita "mallonga korespond-aĵo", la leterojn kiuj havis plikostan tarifon. La karto, el maldika kartoneto, estis eburkolora: sur unu flanko, spaco por la adreso de ricev-onto kaj surprisita poŝtmarko, dum sur la alia, spaco por skribi mesaĝon ne pli ol 20-vortan. Tiuepokaj kartoj do estis "tutaĵoj", nome jam afrankitaj; kelkajn jarojn poste aperis kartoj kun koncerna spaco por alĝui poŝtmarkon.


La ilustrita karto aperis ĉ. en 1870, danke al iu libristo el Francujo kiu ekhavis la ideon ornamu per desegnoj kaj figuroj la kartonetojn, kaj poste, iom pli malfrue, alia franco, *Dominique Piazza*, kreis la unuajn kartojn kun fotoj (1891). Ĉi-tiel, pli-malpli koncize, skize kaj tre supraĵe klarigite, komenciĝis la historio de "Poŝtaj kartoj".

La Internacia Espe-
ranto Serio - Posta
Karto. Unuigo Posta
Universala.

Angla eldonisto el Liske-
ard

Maldekstre: Tiu ci spaco
estas sole por Korespon-
dado en Granda Britujo
kaj Irlando.

Dekstre: Tiu ci spaco
estas sole por la adreso.
(NdR-mankas supersignoj)



Sed, kial “Poŝta karto”? Ĉar temis ne pri nuraj poŝtaj eldonoj, sed simple ĉar estis subkomprenite, ke la poŝto ĝin akceptis kiel korespondobjekton. La novaĵo konsistis en tio, ke tiu karto ne devis esti enkovertigita, ke ĝi rajtis vojaĝi tia kia ĝi estis, de sendinto al adresito, je speciala favora tarifo.

Kaj nun ni parolu pri Esperantopoŝtkartoj.



*Eldonita post la 1^a mondmilito, laŭ desegno de
Noel OTTAVI, de Societe Française
de Propagande de l' Esperanto (SFPE).
“Radiofonio nepre bezonas Esperanton”*

*Propaganda karto, eldonita
de W. Conrad, ano de la
berlina esperantista grupo.
Li piedvojaĝis tra Eŭropo
kaj Norda Afriko, propa-
gandante Esperanton. La
vendo de la PK-oj helpis por
lia vivteno dum la tuta ir-
ado. Li foriris de Parizo
la 28^{an} de aprilo 1911.
Ekzistas ankaŭ alia foto de
li pozanta ĉe la Placo Sank-
ta Marko, en Venecio.*

I. — Voyage à travers l'Europe et l'Afrique du Nord.
W. Conrad, membre du Groupe esperantiste de Berlin, a décidé d'entreprendre un voyage à pied à travers l'Europe et l'Afrique du Nord, dans le but de propager l'Esperanto. Départ de Paris le 28 avril 1911.
— Apprenez la langue internationale « Esperanto ».

II. — Viaggio attraverso l'Europa e l'Africa del Nord.
Il Sig. Conrad, membro del gruppo Esperantista di Berlino, ha deciso d'intraprendere un viaggio a piedi attraverso l'Europa e l'Africa del Nord, con l'intenzione di propagare la lingua « Esperanto ». Partenza da Parigi il 28 Aprile 1911.
— Imparate la lingua internazionale « Esperanto ».

III. — Vojaĝo tra Eŭropo kaj Norda Afriko.
W. Conrad, ano de la Berlina esperantista grupo, decidis entrepreni vojaĝon piedo tra Eŭropo kaj Norda Afriko, por propagandi Esperanton.
Foriro de Parizo la 28^{an} de Aprilo 1911.
— Lerne la helpan lingvon « Esperanto ».



En 1999 estis presitaj du tre interesaj, A5-formataj, libretoj kun po ĉ. 80 paĝoj, fare de la revuo “Franca Esperantisto”. En tiuj estas enlistigitaj la karto aperintaj ĝis tiu jaro en Francio. La titolo estas: “Vagante tra la francaj Esperanto-Poŝtkartoj”. Tekston kaj bildojn disponigis s-ro Jean Amoureux, elstara filatelisto/historiisto, kiu be-

daŭrinde mortis januare 2018, en kies arkivo troviĝis netakseble valora materialo.

En sia postparolo, fine de la dua libreto, pri tio ĉi li atentigis: "... Vagado tra poŝtkartoj estis longa kaj instruveka vojaĝo... (tiuj kartoj) estas plia pruvo pri la riĉeco de nia historio kaj de nia kulturo..." Do, ĝuste tio ĉi estas la celo de ĉi rubriko: per kuriozaj, foje eĉ satiraj aŭ ironiaj, alifoje tre dramaj bildoj, preskaŭ ĉiam tamen elstare artismaj, ni povas sekvi la spurojn de niaj antaŭuloj, per kiuj, siamaniere, ili forĝis nian historion.

Certe ankaŭ vi posedas mirindajn, interesajn, malnovajn aŭ eĉ novajn, tute modernajn, bild/poŝtkartojn, kiuj meritas esti diskonigataj al aliuloj, precipe al la ELF-AREK-anoj, interesigantaj ĝuste pri tiu ĉi temo: Poŝtkartoj el nia Esperantujo!

ED

Kuriozoj




Agrablan, aŭ pli bone dirite, bongustan surprizon trovis en sia kongresa sako ĉiuj kongresanoj kunvenintaj en Triesto: duon-kilograman maizan farunon, malavare donacitan de Michele Basso, la bone konata franca esperantisto kunfondinto de la asocio TAKE, Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj, kaj multjara membro de ELF-AREK. Sur ĉiu paketo estas algluita etiketo kun esperantlingvaj klarigoj pri kuirado kaj enhavo. Eĉ aldonita estis flugfolio pri historio de polento kaj tri receptoj. Sur tiu ĉi estis ankaŭ surprisita alvoko de Michele Basso: *Se oni deziras, ke esperanto estu uzata en la komerca mondo, en la ĉiutaga vivo, tio postulas grandkvantajn mendojn ĉe industrioj.*

Tamen ni sukcesis havi tiun polenton tujpretan en unu mendo de 500 saketoj. La fabrikanto zorgis mem pri la etiketo en esperanto, ni nur tradukis la klarigojn. Ni ŝatus daŭrigi estontece, fondante ESPERANTO-KOOP por instigi produktistojn uzi esperanton sur etiketoj, sed por tio devas ekzisti merkato. Se ni estus multnombraj, ni povus sukcesi, havante eĉ favorajn prezojn. Tiun polenton ni akiris ekzemple je 25 % malpli koste, ol la merkata prezo. Se vi estas interesataj pri tiu projekto aŭ por kunlabori por fari produktojn, kontaktu: Asocio TAKE-Esperanto - lug-esperanto@orange.fr.

Esperanto-cenzuro - pintoj ligiĝas

Ĝi estus nur unu plia ekzemplero de poŝtkarto, kiu jam troviĝas en mia kolekto - kaj certe en multaj kolektoj, ĉar ĝi estas relative ofta kaj alirebla. Temas pri karto, kun studie prilaborita foto de modelo de la unua Esperanto-Monumento en la mondo, en Franzensbad, germana nomo de nuna Františkovy Lázně (Ĉeĥio). En 1914, parto de Aŭstrio-Hungario, la urbo gastigis la 4an Tutaŭstrian E-kongreson kaj en dimanĉo, la 31an de Majo, oni inaŭguris la monumenton altan je preskaŭ kvar metroj sur tri metrojn alta bazo. La eldonisto de tiu karto estis la iniciatinto mem de la konstruaĵo, la esperantista fervojisto Jakob Hechtl (1872-1928), kiu bonŝance ne postvivis por vidi ĝian detruon fare de nazioj en 1939.

Danke al artikolo de D-ro Jaromír Boháč por moderna bulteno en Františkovy Lázně, mi eksciis, ke la monumento estis kreita de jam konata skulptisto Karl Wilfert la Juna (1879-1932) kaj farita el 50 blokoj el kalkoŝtonoj. La loka konsilantaro aljuĝis 4 mil kronojn, duonon de la necesa mono, malgraŭ la kontraŭstaro de du konsilantoj - unu pensis, ke Esperanto ne daŭros, do ne indas investi la monon. La alia pledis por investo en monumenton dediĉitan al io germana, ne internacia.



Tamen ree al la specifa ekzemplero de la karto: la intereso pri ĝi troviĝas sur la dorsflanko. Ĝi estis sendita de ĉeĥa aŭstro Rajmund Cech (n. 1896), tiam freŝa esperantisto kaj poste multjara E-aktivulo. La karto atingis sian celon, Doetinchem (Nederlando), en la 24a de aprilo 1916

afrankita laŭ “TCV” (“timbre côté vue”, t.e. poŝtmarko gluita sur la bildflanko). Manskribita noto de la sendinto, germane: “Cenzuro por Esperanto en Oderberg”. Oni tamen ne opiniis tiun procedon necesa, ĉar la karto iris al sia celo kun du cenzuraj ruĝstampoj “Überprüft WIEN 1” (Kontrolita), do tra Vieno mem.

Oderberg troviĝas je 1 km de la germana landlimo kun Pollando. Ĝia nomo kiel “E-cenzurejo” ne estis al mi fremda... en mia kolekto de jaroj troviĝas germanlingva reklamkarto pri Esperanto, verkita en Esperanto de la polo Salomon Kornfeld/Grenkamp (1896-1943). Ĝi surhavas nete stampitan “K.u.K”-stampon, pri Militista Imperia Cenzuro. Laŭ konfirmo de nia karmemora esploristo Jean Amouroux, Salo Grenkamp, kiu eklernis Esperanton en 1914, estis la cenzuristo de siaj E-korespondaĵoj dum militservado en Oderberg.

Tiu fakto verŝajne estis konata tra la gazetaro, ĉar la viena sendinto de la franzensbada karto ne hezitis mencii tion! Aliaj esperantistoj laboris kiel cenzuristoj dum la Unua Mondmilito, kiel ekzemple Acácio Lobo (Portugalia). Kaj oni memoru, ke tiun rolon siatempe havis eĉ la patro de L.L. Zamenhof mem, Marko (1837-1907)!

James REZENDE PITON (Brazilo)

Kennen Sie Esperanto?

Wenn nicht, beachten Sie bitte folgendes:

Esperanto ist die Lösung des Weltsprachen-Problems, eine Hilfssprache, die den internationalen Verkehr und Gedankenaustausch aller Berufsklassen erleichtert. Die verblüffende Einfachheit dieser Sprache, ihre leichte Erfornbarkeit und ihr Wohlklang, sowie die Möglichkeit, sie in jeder Weise praktisch gebrauchen zu können, sind ausschlaggebend für die Erfolge des Esperanto, das sich im unaufhaltsamen Siegeslauf die ganze Welt erobert. Ueber die jetzige Verbreitung der Esperanto-Sprache muss jeder k. k. **lernen!**

stauen. In 65 Ländern der Erde bestehen in 1900 Orten mehr als 2000 Esperantisten-Vereine und erscheinen ca. 100 Esperanto-Zeitschriften. Die Welt-Esperanto-Vereinigung hat in 1000 Städten aller Erdteile Auskunftstellen eingerichtet, die über alle Fragen des internationalen Verkehrs Auskunft geben. Auf internationalen Esperanto- und verschiedenen Fach-Kongressen hat sich Esperanto als Verhandlungssprache glänzend bewährt. Niemand sollte versäumen, dieses ideale Hilfsmittel des modernen Weltverkehrs kennen zu **lernen!**

Kostenlose Auskunft erteilt
Esperanto-Zentrale, Dresden-A. 1
Struvestrasse 40

100 Stück dieser Karte M. 100 postfrei

Feldpost

Dr. Extrinstate Lujowicz

h. Baroch

apothekist in obern

Apotheke

Pol. Ostrau

(Strasse)

(Ort)

K.u.K.FELDPOST


1

1911

Unu plia perlo de James REZENDE PITON!

La suba karto estas uzita decembre 1916: ĝi estas unu el la ekzemploj pri la klopodoj utiligi Esperanton en la perado de korespondaĵoj dum la Unua Mondmilito, samkiel UEA - favore situanta en Svislando - abunde faris. Aĥilo Tellini, fondinto kaj unua direktoro de la Itala Katedro de Esperanto, verŝajne disponigis en publikaj (ĉu poŝtaj? ĉu militistaj?) oficejoj la kartojn, kiuj havis senpagan afrankon laŭ la preskriboj de la Konvencio de Hago. Krom servi al la familioj de milit-prizonuloj, lia ideo produkti plene trilingvajn kartojn estis bela maniero reklami Esperanton.

Unu monaton tiu ĉi ekzemplero bezonis por vojaĝi 1000 km inter La Spezia kaj la aŭstra Sigmundsherberg, tra Vieno, kiel atestas la cenzurstampo.



**Jam aĉetebblas ĉe UEA la glumarkoj de la 105^a
Universala Kongreso de Esperanto, okazonta
en 2020 en Montrealo, Kanado.**

**Unu folio (9,5x19,50cm) kun 8 rondaj glumar-
koj kostas 1.50 €; triona rabato ekde 3 ekzem-
pleroj (plus sendokostoj).**

LA ESTONTO ESTAS NIA

La “Federazione Esperantista Italiana” fondita en 1910, eldonis sian personan membrokarton aŭ “Tessera Personale”. La objekto kiun ni en ĉi-numero lasas suriri la scenejon estas membrokarto rezervita al iu ino Augusta Zarri, el Bolonja, kiu en 1921-22 havis kiel membro-numeron 822. Ĝi estas subskribita de Francesco Pizzi, sekretario de Itala Esperanto-Federacio.

Lando: Italio
Mezuroj: 109mm x 72mm
Detaloj: rondigitaj anguloj
Eldonist(ej)o: LIT Rag C. SALA & C. - MILANO



Koloroj: verda, viola, nigra kaj blanka
Eldonkvanto: minimume 822
Jaro: 1921 – 22
Tipo: nacia E°-membrokarto

Averso: superba sceno kun galopanta ĉevalo kaj nuda rajdanto ĉirkaŭpremanta per la maldekstra mano brulantan torĉon, kaj per la dekstra iun flageton aŭ standardon.

Fone: grandlitera slogano LA ESTONTO ESTAS NIA (ekde 1905 la unua nederlanda esperanto-grupo same tiel nomiĝis!). Krome sufiĉe granda, verda stelo.

Reverso: en verdaj literoj - FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA - Tessera Personale (persona membrokarto) del Sig. (de Sinjor/

in/o) *iscritto al N.* (enskribita sub n-ro) *per anno* (por la jaro)

FIRMA DEL SOCIO (SUBSKRIBO DE LA MEMBRO)

IL SEGRETARIO GENERALE (LA ĜENERALA SEKRETARIO)

Informoj plenigitaj per nigra manskribo

Du stampoj:



Viola stampo:

INSTRUISTA ESPERANTO-GRUPO

BOLOGNA

Reliefa stampo:

FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

kun steleto en la mezo.

La stampo troviĝas en kvadrato kiu probable estis rezervita por foto.



Kvankam la kulmino de la belepoka stilo de Novarto tiam jam estis pasinta, la stilo de la karteto estas miksaĵo de du diversaj stiloj: la novarta kaj la artdekor. Komparante kun la ikona novarta afiŝo de la UK 1909 en Barcelono, oni devas konstati, ke la samaj temoj kaj pimpa prezento regas.



Tamen, la eksploziva dinamiko de “frostita” movo estis pli tipa por la artdekor stilo, kiel ekzemple en la flulinia formo de rapidaj aŭto-



mobiloj kun sugestaj kapotaj talismanoj, ekzemple ankaŭ tiu de la mondfama Rolls Royce.

Bert BOON (Belgio)

② ② ② ②

Fontoj:

Enciklopedio de Esperanto, represo de la unua eldono, Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1986, p. 537.

La Verda Lupeo, aprilo 2019 (51a jaro) n-ro 180, p. 7-9.



Propaganda karto, eldonita de la Venecia E-grupo. Jaro 1920 ĉ. Grafikisto Augenti.

Ekspozicio pri TRIESTO KAJ ESPERANTO

Organizita de Triesta Esperanto-Asocio en la salonoj de la Poŝta kaj Telegrafa Muzeo Mezeŭropa, kunlabore kun la Italaj Poŝtoj kaj direkcio de la Muzeo mem, ĉi elmontrado - inaŭgurita posttagmeze de la 23a de aŭgusto, unu tagon antaŭ la komenco de la 86a Itala Kongreso de Esperanto -, celas prezenti la historian disvolviĝon de Esperanto en Triesto per vortoj sed ankaŭ per fotoj, per diversaj bildoj aŭ originalaj E-filatelajoj: ĉio skribita dulingve - itale kaj esperante.

Tamen ne estas hazardo, ke Esperanto, Filatelo kaj historio de Poŝtoj interplektiĝas, ĝuste tie ĉi en Triesto. Tutunue, ĉar *la lingvo-ekumenismo* de Esperanto trovas la ĝustan metaforon en la mondo de Filatelo. “Ĉiu lando kreas siajn poŝtmarkojn surbaze de propraj kulturo, tradicioj kaj lingvo” diras Edvige Ackermann, prezidanto de la Triesta Esperanto-Asocio, “sed temas pri diverseco daŭre serĉanta interŝanĝon, komparon, kundividon cele al reciproka konatiĝo. Preci-ze kiel Esperanto.”

“Krome,” intervenas la direktorino de la Muzeo, Chiara Simon, “*poŝta kaj triesta* estis la fondinto de la unua Esperanta Rondo Trieste, tiam kun sidejo en Placo de Borso.”

Arturo Ghez, (1873-1955), doktoriĝinta pri juro en Graz, enposteniĝas kiel sekretario ĉe la triesta Direkcio pri Poŝto kaj Telegrafo.

Posteitaliane

MUSEO POSTALE
TELEGRAFICO
EUROPEO


Piazza Vittorio Veneto 1
TRIESTE



Associazione Esperantista Triestina
Triesta Esperanto-Asocio
Via del Coroneo 15 - Trieste



Dott. Arturo Ghez,
Ufficiale dell'imperial regia direzione
poste-telegrafi dell'impero asburgico
Ufficio de la Reĝ-imperia direkcio
Poŝta-telegrafa de Habsburgo Imperio



TRIESTE E L'ESPERANTO
Mostra storica

INAUGURAZIONE
23 agosto 2019 - h. 17.00
INAUGURO

TRIESTE KAJ ESPERANTO
Historia ekspozicio

Pro sia laboro li faras multajn vojaĝojn tra Eŭropo, dum kiuj li konatiĝas kun Esperanto. Je ĝi li tiom enamiĝas, ke li fariĝas energia propagandisto kaj profesoro pri la internacia lingvo. En 1906 d-ro A. Ghez fondas la Esperantan Rondon Trieste, havante ĉirkaŭ si plej fervorajn triestajn kunhulpantojn. Lia devizo estis: “Esperanto disfaligos la barojn, kiuj de jarcentoj dividas la homaron.”

La ekspozicio restas malfermita ĝis la 28a de septembro kaj ĝis nun ĝin vizitis pluregaj esperantistoj, turistoj kaj kompreneble triestanoj.

Okaze de la 86a Itala Kongreso de Esperanto (24-31 aŭgusto 2019) estis eldonita ankaŭ porokaza stampo: mezuroj 31 mm x 31 mm; 86° CONGRESSO ITALIANO DI ESPERANTO, ankaŭ internacilingve; dato 25.8.2019. La bildo prezentas la triestan urbodomon, desegnitajn de Mirko Nikodimovich, membro de TEA.




Krom la poŝtkarto pri la ekspozicio, estis eldonitaj kvar aliaj, prezentantaj vidaĵojn de Triesto: La Granda Kanalo kaj preĝejo Sankta Antono la Nova, parto de Palaco Polacco [Polako], preĝejo Serbo-ortodoksa kaj parto de la novstila Domo Giovanni Richetti [Riketi].

La poŝtkartoj kostas po 1,00 eŭro, sen stampo, aŭ po 2,00 eŭro, afrankitaj kaj kun stampo plus sendokostoj. Kiu deziras ricevi ilin, bv. skribi al Elda.



Palaco Polacco



ZEO - ZAMENHOF/ESPERANTO-OBJEKTO

Evidente ZEO-j ne povas esti konsiderataj propre esperantaĵoj, kvankam gramatikvidpunkte, esperantaĵo signifas ĝuste “io, kio rilatas al Esperanto aŭ karakterizas Esperanton (NPiv)”, dum - laŭ la vidpunkto de la AMIKA RONDO DE ESPERANTAĴ-KOLEKTANTOJ - tiuj ZEO-j ne estas tiel facile arigeblaj propradome aŭ por konservi ilin en dosiero-ŝranko. Tamen ankaŭ tiuj estas nepre indaj je atento de la tuta esperantistaro, ĉar tiuj objektoj tre trafe kaj vaste parolas pri la historio de Esperanto kaj ties movado, sekvante la tempopason, kiel same okazas rilate al filatelaĵoj aŭ poŝtkartoj, glumarkoj, insignoj ks.

Estas fakte tre atentokapta la historio de tiuj Objektoj, kiujn detale priskribis Hugo Röllinger en sia libro “Monumente pri Esperanto”. Estis CED - Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA, kiu ekregistris la informojn pri ZEO-j tra la mondo, kiujn poste la germana e-isto kompletigis kaj aktualigis dum pli ol 30 jaroj da intensa laboro.

Menciindas, ke pluraj esperantistoj engaĝiĝis en tiu traserĉado por subteni lian agadon, havigante al li ĉion kio povus esti utila por ĝisdatigo kaj kompletigo de tiu vere giganta faraĵo - fotoj, dokumentoj, datumoj plej diversaj...

En la libro estas listigitaj/dokumentitaj 1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj el 54 landoj. Sekve, ekde 2001, por tiu laboro de ZEO-katalogado estis komisiita la konata franco Raymond Boré, kiu estis ankaŭ membro de ELF-AREK. Post lia morto, en 2010, surprenis tiun taskon Robert Kaminski el Pollando, kiu jam de longa tempo estis lia asistanto.

Eble malmultaj scias, ke probable la unua Objekto - laŭ la ĝisnunaj esploroj - estas la ŝipo ESPERANTO, konstruita kaj eknaviginta en 1896, naŭ jarojn post la apero de nia lingvo. Ŝajnas, ke en Malago loĝis Jose Rodriguez Huertas, fondinto de la unua E-societo en Hispanio (la 5a en la mondo) havanta altan reputacion en la urbo kaj persona amiko de hispana deputito, kiu certe grave influis la oficialan nomigon de la ŝipo. Ĝi servis navigante dum 70 jaroj, ĝis kiam en 1966 oni dronigis ĝin en la haveno de Las Palmas de Gran Canaria (*laŭ informoj trovitaj de Kanariaj esperantistoj*).

Sed kial paroli pri ZEO-j? Ĉar lastatempe atingis nian redakcion bele ilustrita faldfolio, kiu altiris mian plenan atenton. “Kiom da ZEO-j” mi ekkriis “kaj ĉiuj samaj en la sama urbo!” En kiu urbo? En Herz-

berg am Harz, kompreneble, die ESPERANTO-STADT / LA ESPERANTO-URBO.

Herzberg - kiel ja konate - estas loko kie esperantisto trovas preskaŭ ĉie la propran lingvon: sur vojmontriloj, en ĝardenoj, antaŭ kaj en la fervoja stacidomo, en arbaroj, kaj kiam li/ŝi lacas pro serĉado de ZEO-j, jen komforta ligna benko je dispono por ripozi. Ja, vojo da Esperanto-benkoj!

La tuta benk-itinero estis sponsorita de pluraj helpemaj esperantistoj. La unua benko situas antaŭ Interkultura Centro Herzberg (Eo-informejo), ekirpunkto de ekskursoj.

La benko 177, ĉe la Jues-lago, proksimas la subĉielan naĝejon. Havu agrablan paŭzon kaj rigardu la belan lagon, ĉirkaŭ kiu troviĝas la Arbo-instrupado. Pli ol kvindek raraj arbospecioj havas klarig-tabulojn germane, latine kaj Esperante. *Sponsoro: Alke Geveke (DE)*

Joachim GIEBNER-fotelo: artisme skulptita sidloko en „Sinnesgarten“, projekto far Zukunftswerkstatt (Futurateliero) Herzberg pri la mult-talenta Esperanto-pioniro.

Irene GIEBNER-fotelo: artobjekto pri la iama jogo-instruistino en Herzberg, edzino de Joachim. Ĝi same troviĝas en „Sinnesgarten“.

Sur la Zamenhof-placo (inter la akvorado kaj la Zamenhof-monumento) staras Esperanto-benke el nigra granito. *Sponsoro: Bent Holm Laur-sen (DK)*



Survoje al la kastelo, ekzemple sur la pado „Freudenstein“ - ĝojŝtono, aŭ uzante la ĉirkaŭ cent ŝtupojn al la kastelo, jen Esperanto-benke - sen dorsa apogilo - ĉe la promenvoja kruciĝo. *Sponsoro: DEFA (DK)*

Inter la enirejoj de la kastelaj muzeo kaj restoracio staras plua benke. Sidiĝu kaj spiru, poste esploru la belan faktraban Welf-kastelon kaj ĝian turon. Investu tempon por viziti la multteman muzeon. Ne pre iru al la plej supra platformo por rigardi Esperanto-rilatajn fakekspoziciojn. *Sponsoro: DEFA (DK)*

En julio 2016, okaze de la 10-jara jubileo de Herzberg am Harz kiel Esperanto-urbo, estis starigita benke kun ŝildeto memore al la long-

jara GEFA-sekretariino Elfriede Kruse (1914-2016). *Sponsoro: Germana Esperanta Fervojista Asocio*

Esperanto-benke
La reloj ligas la landojn.
Esperanto la popolojn.
Memore al Elfriede Kruse

Proksime al la hospitalo ĉe la monto Heuer:

tie eblas esplori ankaŭ la tuj apudan Seelenpfad (Animpado) de la Nacia Parko Harz. Antaŭ la ŝildo 'Nacia Parko Harz' iru maldekstren (okcidenten) sur la t.n. Karst-migradvojo al Mühlenberg.



Post ĉ. 250 m, ĉe la haltopunkto 'Bärenwinkel' (Ursa anguleto) troviĝas la ligna sidilo donacita de Harzklub Herzberg: 'ESPERANTO-BENKO Marto 2012'.

Ĝi estis la unua. Komforte sidante, oni ĝuas ĉarman panoramon al la bela Welf-kastelo.

De la hospitala parkloko orienten, post ĉ. 250 metroj, sur migradpado al la Lonau-

valo, oni trovas iom kaŝitan benkon. *Sponsoro: Hermann Bieber (DE)*

De tie denove bela vidaĵo al la kastelo kaj en sunaj tagoj al la Ohm-montaro en Turingio. Tra la Lonau-valo baldaŭ atingeblas la natura akvofalo. Tie estas informtabuleto en Esperanto kaj klarigoj pri la longa Karst-migradvojo. De tie oni reiras en la urbocentron.

Apud la rivero Sieber kaj proksime al la urba junulardomo troviĝas la Domeyer-parko. Tie staras du Esperanto-benkeoj.

En la proksimeco de la eta infanludejo troviĝas bela stabila benkeo el granito, kiu iam staris en la stacidomo Herzberg. Foje aŭskultu la murmuradon de la apuda Sieber-rivero! *Sponsoro: anonima*

En la ĝardeno de la Esperanto-Centro troviĝas du ripozbenkeoj. Dum-somere tie staras pavilono. Unuavice ĝi servas por Esperanto-renkontiĝoj kaj gastoj. Tie eblas uzi elektran kontaktingon kaj sendratan retkonekton. Ankaŭ senkostaj refreŝigaj trinkaĵoj por membroj kaj gastoj disponeblas. Laŭ interkonsento oni povas viziti la Esperanto-Centron, kie troviĝas arkivo kaj unu el la plej grandaj E-bibliotekoj en la mondo. Tie riceveblas informoj pri Esperanto, pri la Centro kaj pri ekskursoj en la regiono. Kaj por fini, multaj floroj kaj plantoj havas esperantlingvajn ŝildetojn tie ĉi: la grimprozujo 'D-ro Zamenhof', la violetkolora klematito 'Esperanto' kaj la belega 'Rozo de la Espero' kreskas tie. Nun al vi la agrabla tasko malkovri la multajn, kromajn ZEO-jn en Herzberg, la Esperanto-Urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.

Dankon pro la informoj al Peter kaj Zsotia

KIEN NIAJ KOLEKTOJ?

Dum la itala kongreso en Triesto, aŭguste ĉijare, aliris min du ĉarmaj sinjorinoj, du fratinoj el Svislando: el mansako ili ridetante eligis du poŝtmark-album(eg)ojn kaj grandan koverton plenan je... io papera. “Ni scias,” unu el la du ekdiris, “ke vi okupiĝas pri filatelaĵoj, do tial ni pensis, ke certe vi aprecos ĉi nian donacon. Nia patro, jam de jaroj mortinta, estis amatora filatelisto, kolektanto de poŝtmarkoj, ĝenerale, kaj specife, pri Esperanto. Tiu ĉi estas lia postlasaĵo: ĝi kuŝis dum longega tempo en nia hejmo kaj per ĝi ni ne sciis, kion fari. Forĵeti la tuton, ne, ni ne volis, sed transdoni al iu interesito, jes! Jen ĉio ĉi estas por vi kaj pri ĝi vi disponu laŭ viaj plaĉo kaj decido!”

Jen la grava problemo! Ni kolektas, ame prizorgas, katalogas, amasigas valorajn (eble nur por ni mem) Esperantajn objektojn. Kaj poste? Kiam venas la decida momento, pensi al kiu transdoni tiun materialon, ni ekgapas konsternon. Kaj tiom pli senvortaj kaj senpovaj restas la eventualaj heredantoj. Kion fari? Ĉu disperdigu la tutan kolekton per vendado aŭkcia? Ĉu ĉion vendi al iu ajn komercisto kiu aĉetos per bagatela monsumo la havaĵon de longjara kompetenta kolektemulo?

Ĉiel ajn, ni nepre konsciiĝu, ke oni devas sufiĉe frue antaŭpensi kaj antaŭzorgi pri la estontanta destino de tiaj historiaĵoj.

Kiaj estas la ebloj? Laŭ mi la plej bona estus la transdono de la tuta kolekto al pli juna E-filatelisto/in/o, kies intereso pri ĝi estas certa kaj sincera. Dua solvo povus esti ĝin donaci al UEA, aŭ al Centro de Dokumentado en La Chaux-de-Fonds, al Biblioteko en Madrido, aŭ al...

Pripensante solvon al ĉi problemo, mi navigis iom rete por eltrovi, kiom da bonaj hejmoj por niaj karaj esperantaĵoj ekzistas en Esperantujo, kaj hazarde mi trovis interesan respondon de William Auld al tiu demando, kvankam rilatantan nur al libroj. Pro mankospaco mi ĝin prezentos en la decembra LVL, ĉar krom esti leginda pro la belstila verkado, ĝi povus helpi ankaŭ vin por elekti la ĝustan vojon.

Intertempe pristudu la problemon pri nedisperdigado de via kolekto kaj faru viajn proponojn, diru vian opinion pri ĉi tiu temo: tiel farante vi helpas nin ĉiujn kaj precipe vin mem.

Je la komenco de tiu ĉi artikolo, mi rakontis pri la ricevita donaco: iom mi rigardis la enhavaĵon kaj decidis fari liston de la pm-oj kaj stampoj, kiun kiel eble plej baldaŭ vi ricevos. Pri kostoj mi decidis intertempe: ĉio ricevota eniros la kason de ELF-AREK, kompreneble.

Nek Viroj

Nek Virinoj

Libera Lando Esperantujo
LERNI — UZI — VIVI

PASPORTO

En la nomo de la Esperanta Popolo, ĉiuj Aŭtoritatoj Teraĵ, Maraj, Aeraj, Ĉielaj, estas petataj lasi liberan pasadon al Verdstelulo _____, civitano de nia Libera Lando, sur la bazo de la Boulogne'a Deklaracio de la 7-a Aŭgusto 1905, kiel rezultas el niaj arkivoj.

_____, la _____ de _____ 19____

La Prezidanto, *Spabila Verdstelulo* * La Ĉefministro, *Devota Verdstelulo* *

N. B. — En okazo de mobilizado, ĉiuj Verdsteluloj, sen diferenco pri aĝo kaj sekso, devas sin renkonti ĉe la _____

— La suĉinfanoj devas kunporti boteleton kun lakto.

Kafejo - Restoracio - Hotelo
IMPERATOR
70, R. Beaubourg, Paris-3^e
Kelnero - Emilio Ferrari

Eldonis : FERRARI. Presis : SOLSONA, Paris.

Nek Diaboloj

Nur Verdsteluloj

Tre plaĉis al mi tiu ĉi, neniam antaŭe vidita, sprita pasport-karto, tial tuj decidite ke ĝi devas nepre kuŝi en mia kolektaĵo. Ne nur, tamen: scivolemo instigis min serĉi ion pli pri la eldonisto, nome Emilio Ferrarari. Jen la rezulto, trovita ĉe la jena retejo: <https://arkivo.esperanto-france.org/>, kiu estas senfina puto da detalaj informoj pri la pionira movado en Francujo.

Ĉirkaŭ la jaro 1930 kaj dum la postaj jaroj vivis en Parizo itala esperantisto kun la nomo Emilio Ferrari kaj la ŝerca alnomo *Napoleono*. Li estis taksi-ŝoforo, kun la verda stelo. En ĉiu numero de *La Movado*, la tiama esperanto-gazeto kiun mi posedas de 1931, dato de mia esperantistiĝo, ĝis 1933, dato de ĝia morto, troviĝis reklamo pri tiu verda takso. Li eĉ faris kurson de Esperanto por siaj kolegoj taksi-ŝoforoj, kaj en tiu gazeto estis ofte menciita lia aktiveco kiel esperantisto.

Nu, en 1932 li fariĝis kelnero en kafejo *Imperator*, kaj li ofte vizitadis alian kafejon, *La Talma*, kie ĉiusabate posttagmeze okazis renkonto de esperantistoj, ĉefe relative freŝbakitaj; kaj tie, same kiel en kafejo *Imperator*, ĉiufoje kiam li aŭdis, ke iu parolas francan lingvon, li kolere ekkriis: «Kiu estas tiuj krokodiloj?». Tiu esprimo ne havis por li apartan signifon, li estus povinta insulti per «fuŝuloj, stultuloj, kameloj» aŭ similaj epitetoj, kaj tio estis nur por laŭtigi sian malkontenton, ke oni ne uzas la «karan» lingvon.

Lia esprimo estis tiom ripetata, ke ĝi transiris al aliaj parizaj renkontiĝejoj, kaj poste ĝi fariĝis, migrante de grupoj al kongresoj, eĉ

internaciaj, tiu pura esperantista idiotismo (ne idiotaĵo!), kiun uzi oni havas tiel oftajn okazojn dum niaj «universalaj», ke el tio naskiĝis la spritaĵo: «Ili estas kongresoj, kie oni aŭdas la plej multajn naciajn lingvojn!».

Pri tiu vera origino mi povas nerefuteble atesti, ĉar mi estis ofte aŭdanto de tiu kolereksplodo...

Tio ĉi estas la historio de la vorto «krokodili» rakontita de Roger Bernard kaj ĉerpita el «1887 kaj la sekvo» de G. Waringhien.



Antaŭ kelkaj jaroj, Rudolf Burmeister aperigis en LVL diversajn loteriajn biletojn, apartenintajn al Jean Amouroux, preskaŭ ĉiujn estis hispanajn, kiel la ĉi-supra. Ĝi estas aŭtentika antikvaĵo, ĉar eldonita en 1927. Bedaŭrinde la bildo ne tiom klaras, tamen legeblas, ke la lotumado okazos je la 22a de decembro kaj ke, se iu gajnos per ĉi tiu bileto, oni vizitu S-ron Ferd. Monserrat, [...] Barcelona, kiu donos saketon da bankbiletoj. Prizorgis la loterion S-ro Monserrat mem, taskigita de la Iberia Esperanto-Servo (kies administranto li estis!).

Ricevita!



Mezuroj: 73mm x 3,2 mm

Nominalo: kredeble por sendi al EU-landoj

Eldonkvanto: 500

Eldonis (en 2017): Esperanto-Grupo SENLIME, La Calamine-Kelmis

Informis: Raymond Demarche,

el Verviers. Ĉiuj ekzempleroj jam estas forvenditaj.



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidantino:

Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX

Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.

Kunredaktantoj: James Rezende Piton - sudastelaro@gmail.com

kaj Albert Boon, Esperanto-Numismatika Asocio

bert.boon@skynet.be



Laste trovitaj!

Kiu(j) scias ion pri la supraj du esperantaĵoj?